

# 信じるものは救われるのか

## *Ĉu kredantoj nepre saviĝos?*

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

何ごとのおわしますかは知らねど  
もかたじけなさに涙こぼるる

これは中世の歌人である西行法師が伊勢神宮に参った時の歌です。(この神社のご神体がどういうものかは分からないけれども、なんとなくありがたい気持ちになって涙がこぼれる)・・・この歌は日本人の宗教観を典型的に表していると言われてます。私たち日本人には、このような宗教感情を尊ぶ傾向があります。しかしわけがわからないものをありがたがる、というのはむしろ困ったことではないのでしょうか。西行は仏教僧でもありましたが、この心情は仏教的とはいえません。

「イワシの頭も信心から」といいますが、こういう信仰のあり方は、傍から見ればむしろ滑稽です。滑稽どころか、健全な精神を破壊し、極端な場合は殺人にまで及びます。これがいわゆる「宗教」(盲信)の怖さです。

釈尊は、「信仰を捨てよ」とおっしゃっています。ここでいう「信仰」とは、上に述べたような盲信的なあり方をいいます。

*Ne scianta,  
kio estiminda tie estas,  
larmoj fluas.  
Kiel dankinde!*

Tiu ĉi estas utao de Saigyô okaze de lia vizito al la sanktejo Ise. Li estas mezepoka utaisto kaj budhisto. Li ne scias, kio estas tie adorata, sed estas emociita de religia atmosfero tie fluanta. Tiu ĉi utao bone prezentas la emon de ni japanoj, kiuj ŝatas tian religian senton. Sed ĉu vere estas admirinde havi dankemon al io tute ne konata? Saigyô estis budisto, sed tiu ĉi sento ne estas budhisma.

Janana proverbo diras: *Por kredemuloj eĉ kapo de sardino estas dankinda.* (Sardino estas malkara fiŝo, do kapon de sardino oni forĵetas post manĝo.) Tia kredemo estas ridinda objektive, sed ne nur tio; ĝi detruas sanan spiriton kaj en ekstrema okazo kaŭzas eĉ murdon. Jen tio estas danĝero de tiel nomata *religio aŭ blinda obeemo.*

Ŝakja-munio diris, "Forĵetu kredon!" Tio signifas, ke ni devas forĵeti tian sintenon, blindan obeemon, supre menciitan.

釈尊は知的な理解を大切にされました。疑問をもつことはいいことだ、何かを信じるからには、「何を」「どのように」「なぜ」をはっきりさせねばならない、というのです。

「カラマ・スッタ」というお経があります。これは、釈尊がカラマ族の人々に、次のように語ることから始まります。「この世には数多くの『教え』を説く者があり、それぞれが我が教えこそ真理である、我が奉じる説こそ真実であると主張して譲らず、また他の説を虚妄であるとして批難する者がある。けれども、それを聞く者としては、その多様性とそれぞれ矛盾する思想内容によって判断に窮し、むしろそれらすべてへの疑惑と不審とを増すばかりである。そこで、それらが真理であるのかどうかをどのように判断すべきか。」

みなさんはどう思われるでしょうか？釈尊は、ある説が真実であるかどうかを判断するのに、次の十の項目に依拠してはならないと論じています。

1. 風聞・伝聞
2. 伝承（伝統）
3. 憶説
4. 聖典の所伝
5. 推論（理屈）
6. 定式化された見解（常識）
7. 類比
8. 予見
9. 表面的な可能性
10. 師匠の説

Ŝakja-munio alte taksis intelektan komprenon. Laŭ li, havi dubon estas bone; ni devas klarigi KION, KIEL kaj KIAL kredi, se kredi ion.

Troviĝas la sutro nomata *Kalamasutta*. Tiu ĉi sutro komenĉiĝas per la parolo de Ŝakja-munio al la familio Kalama. “En tiu ĉi mondo troviĝas multaj, kiuj predikas *instruon*. Ili ĉiuj asertas: ‘Mia instruo sola estas la vero, mia opinio sola estas la realo. Aliaj instruoj kaj opinioj estas falsaj.’ Tiel ili kritikas kaj riproĉas aliajn reciproke. Sed aŭskultantoj estas embarasitaj, ĉar iliaj opinioj kaj instruoj estas diversaj kaj kontraŭstaras inter si. Tial duboj kaj suspektoj kontraŭ ili ĉiuj pli kaj pli grandiĝas. Do, kiel ni devas juĝi, ĉu iliaj asertoj estas veraj aŭ ne?”

Kiel vi opinias? Ŝakja-munio listis jenajn dek punktojn, de kiuj ne devas esti juĝita la vereco de iu tezo.

1. onidiro aŭ famo (ne devas esti la kriterio de vereco)
2. tradicio
3. supozo aŭ konjekto
4. priskribo en sanktaj libroj
5. teoriumado
6. formulita opinio aŭ komuna kompreno
7. analogio
8. antaŭvido
9. surfaca ebleco
10. opinio de majstroj

これはネガティブリストですから、では何を基準にすればいいのか、は明言されていませんが、釈尊は他の箇所ですらたびたび、「苦の解決に役立つ教えこそが真実である」と言われます。

大切なことは、盲信・盲従を避け、批判的な精神を持ち続けることなのです。例えば、第4の「聖典の所伝」あるいは第10の「師匠の説」に依るのは、宗教としては当然であるかのように思われています。しかしそれも盲信なのです。

一切の権威や固定観念に頼らなことは、しかしながらそれほど易しいことではありません。私たちはつい何かを無批判に受け入れ、知らず知らずのうちに本当だと思い込んでいることがあるのではないのでしょうか。それは宗教だけでなく、政治や学問の分野でも同じことが言えるでしょう。

原点を忘れないようにせねばなりません。私たちは仏教徒として何を願うのか？その目的は生きる上での苦を解決し、自分だけでなくすべての人々の幸福のための道筋を見出すことではないのでしょうか。そしてその道筋は誰もが納得いくものでなければなりません。つまり万人と共有できるものでなくてはならず、特定の人だけに通用する方法、格別の熱心さが要求されるような方法であっては、ほんとうの救いは得られず、ただ「救われたような感じがする」だけで終るのではないのでしょうか。

Tio ĉi estas negativa listo, kaj Ŝakjamunio ĉi tie ne klare montris pozitivan kriterion. Sed li en aliaj lokoj foje diris, "La instruo, kiu utilas por solvo de suferoj, estas vera."

Grave estas ekskludi blindan kredon kaj blindan obeemon, kaj tenadi kritikan spiriton. Ekzemple la kvara (priskribo en sanktaj libroj) kaj la deka (opinio de majstroj) ŝajnas esti pozitivaj kiel religiaj kriterioj, sed eĉ ili estas evitendaj.

Konfidi nin al neniu presitiĝo, al neniu fiksita ideo; tio ne estas tamen tiel facila. Ni inklinas akcepti ion senkonscie kaj senkritike, kaj opinii, ke io estas vera. Tio okazas en la sferoj ne nur de religio sed ankaŭ de politiko kaj scienco.

Ni ne devas forgesi nian originon. Kion ni budhanoj deziras? Ĉu nia celo ne estas solvi suferojn en la vivo, kaj trovi la vojon al vera feliĉo de ĉiuj homoj? Tiu vojo devas esti tia, kian ĉiu ajn povas aprobi; ĝi devas esti komune posedata de la tuta homaro. Se ĝi estas aplikebla nur al specifaj homoj, aŭ se ĝi postulas specialan entuziasmon, ĝi ne alportas veran feliĉon. Tiuokaze ni ne estas savitaj, sed nur sentas, ke ni estus savitaj.